

La 56-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET-56)

INFORMILO No 1

Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni la 56-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-56) – la plej popularan Esperanto-aranĝon en Baltiaj landoj, la aranĝon kiu havas jam pli ol 60-jaran historion (la unua BET okazis en 1959 en Latvio).

TEMPO: BET-56 funkcios de la 4-a ĝis la 11-a de julio 2020.

LOKO: BET-56 okazos en Jelgava – la kvara plej granda urbo de Latvio (\approx 63 mil da loĝantoj). Ĝi situas en la centra parto de la lando en Zemgale ebenaĵo ĉe la rivero Lielupe je distanco 42 km for de Rigo, 295 km for de Vilnius kaj 350 km for de Tallinn.

BET-ejo: La Teknika lernejo de Jelgava.

ADRESO: strato Pulkveža O. Kalpaka 37, Jelgava.

PROVIZORA PROGRAMO: diversnivela Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, Interkona, Nacia kaj Adiaŭa Vesperoj, muzikaj kaj artaj programeroj, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj.

KOTIZO:

Landoj laŭ kategorioj	ĝis la 31.12.2019	ĝis la 31.03.2020	poste kaj surloke
Latvio, Litovio, Estonio	35 EUR	45 EUR	55 EUR
Landoj de kategorio A	40 EUR	50 EUR	60 EUR
Landoj de kategorio B	55 EUR	65 EUR	75 EUR

A: Iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; B: Ĉiuj aliaj landoj.

Infanoj kaj lernantoj aliĝkotizon ne pagas, studentoj kaj handikapuloj pagas 50% de la kotizo.

LOĜADO: ni proponas jenajn loĝeblecojn:

- 1) po 12 EUR diurne por persono en 2 lita ĉambro en studenta hotelo de Teknika lernejo (duŝejo kaj necesejo por 3 ĉambroj), matenmanĝo ne inkluzivita.
La prezo estas provizora kaj povas iom ŝanĝiĝi.
- 2) en hoteloj de Jelgava (diversaj prezoj) – rezervado memserva pere de booking.com k.a.

MANĜADO: 3 foja manĝado po 12 EUR tage (matenmanĝo – 3 EUR, tagmanĝo – 5 EUR, vespermanĝo – 4 EUR en la manĝejo de la Teknika lernejo. La unua manĝo dum BET-56 – matenmanĝo la 5-an de julio, la lasta – matenmanĝo la 11-an de julio. Por ricevi manĝon la 5-an kaj la 6-an de julio bonvolu pagi anticipe. Dum Ekskursita tago 08.07. tagmanĝo proprakoste, vespermanĝo en la Adiaŭa vespero 10.07. – 6 EUR.

ALIĜO: Aliĝu rete www.esperanto.lv aŭ plenigu la aliĝilon kaj sendu: margarita.zelve@gmail.com aŭ al Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Rigo, Latvio. Samtempe pagu la aliĝkotizon.

PAGEBLECOJ:

- 1) Al la bankkonto de Margarita Želve: Swedbank, SWIFT: HABALV22, IBAN: LV71HABA0551022317372;
- 2) sendi poŝte al LatEA (al kasistino Aina Januŝevska);
- 3) ĝiri al konto de Latvia Esperanto-Asocio *lase-b* ĉe UEA (**NUR ALIĜKOTIZOJN**)
- 4) interkonsenti kun Organiza Komitato pri alia pagmaniero;

Aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

Dezirinde samtempe pagi ankaŭ pri loĝado kaj manĝado, kaze de nealveno, tiu mono estos repagita.

ATINGEBLECOJ: Jelgava, situanta 42 km de Rigo estas facile atingebla trajne kaj buse.

KONTAKTEBLECOJ:

- 1) rete: margarita.zelve@gmail.com
- 2) poŝte: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio
- 3) telefone: + 371 26407174 (Margarita Želve), + 371 28486628 (Biruta Rozenfelde)

La detalan informon kiel atingi BET-ejon, pri ekskursoj, programo k.a. en Informilo No 2 oni ricevos junio 2020.

BONVENON AL LATVIO!
Organiza komitato